



# LI KAJ NI

Festlibro de Akademio de Esperanto  
omaĝe al profesoro Gaston Waringhien



ISBN 90 6336 034 7

© ĉe eldonejo kaj  
Akademio de Esperanto

D/1985/2639/2

Presita en Belgio de la eldonejo

# LI KAJ NI

**Festlibro por la 80a naskiĝtago  
de Gaston Waringhien  
(1901 - 29 Julio - 1981)**

**Editoris  
Reinhard Haupenthal**



**ANTVERPENO - LA LAGUNA**

## DETERMINO PER KAJ SEN ARTIKOLO EN LA INTERNACIA LINGVO\*

De FABRIZIO A. PENNACCHIETTI

0.

La nocio "determino de la nomo" ne estas tiel neta kaj memkomprenebla kiel oni ofte supozas. Pro tio en tiu ĉi referaĵo ni ĝin distingos disde la nocio "semantika modifo de la nomo" agnoskante la funkcion determini nur al la morfemoj apartenantaj al limigita inventaro, la "gramatikaj monemoj" de Martineta terminologio, kiuj havas la taskon aktualigi la nomon, t.e. eligi ĝin el la inertecon de la vortprovizo kaj doni al ĝi la disponeblecon ludi ĝian semantikan rolon en la frazo<sup>1</sup>. Tiuj ĉi morfemoj, konvencie nomataj "determinantoj" [D], en Esperanto disdividiĝas en la jenaj subklasoj:

- 1 — la difina artikolo [ART]: *la*;
- 2 — la demonstrativoj [DEM]: *tiu (ĉi), tia*;
- 3 — la indefinitoj [IND]: la nulartikolo  $\emptyset$ , *unu, iu, ia, kelka, ajna* (oni povas tie ĉi enlistigi ankaŭ la demandajn kaj negativajn "adjektivojn" *kiu, kia; neniu, nenia*);
- 4 — la kolektivoj [KOL]: *ĉiu, ĉia; ĉiuj, ambaŭ*;
- 5 — la posesivoj [POS]: *mia, via, lia...; kies, ties, ies, ĉies, nenies*;

\* Referaĵo prezentita je la I-a Internacia Interlingvistika Konferenco, Universitato ELTE, Budapeŝto 24-28 julio 1978.

6 — la adjektivo *tuta* [TUT];

7 — la bazaj numeraloj [NUM]; *du, tri, kvar...*; *pluraj, multaj, malmultaj*;

8 — la ordaj numeraloj [ORD]; *unua, dua, tria...*; *alia, lasta, sama, nura, cetera, plia, plua, kroma*, k.t.p.

Ilia plej ĝenerala funkcio, laŭ la genera-transformacia teorio, estas klasifiki la nomon [N] kiel nominalan sintagmon [NS]: NS → D + N<sup>2</sup>. Ĉiuj ceteraj elementoj, la “leksikaj monemoj” aŭ “leksemoj” de Martinet, kiuj eventuale akompanas la nomon, t.e. la kapon de la NS, ricevos de ni la difinon “semantikaj modifantoj” [M]<sup>3</sup>. En Esperanto ili povas esti epiteta adjektivo, prepozicia sintagmo, infinitivo, subpropozicio.

Stariginte tiun distingon, oni rimarkas, ke ne ĉiu el la ĵus menciitaj determinantoj havas la saman pezon en la ekonomio de la lingvo. La difina artikolo ekzemple, krom aktualigi la nomon kaj ties eventualan modifanton, havas ankaŭ la funkcion starigi opozicion inter la “difina determino” kaj la “nedifina determino”, t.e. montri per ĝia ĉeesto aŭ malesto, ĉu la parolanto supozas aŭ ne, ke la aŭskultanto estas informita pri la referento de la koncerna nomo. Pri tiu ĉi aparta tipo de nomdetermino, la “difina determino”, temas nia referaĵo, por montri kiamaniere la Internacia Lingvo esprimas ĝin kaj per kiaj rimedoj.

#### 1.

En Esperanto, kiel en ĉiu alia lingvo, la nomo, akompanata de unu aŭ pluraj determinantoj (inkluzive de la nulartikolo) kaj eventuale de unu aŭ pluraj modifantoj, havas la eblecon rilati ĉu al (a) referento, kiun la parolanto supozas jam konata de la aŭskultanto, ĉu al (b) referento, kiun konas nur la parolanto, ĉu al (c) referento, kiun konas nek la parolanto nek la aŭskultanto, ĉu fine al (ĉ) referento tute ne identigebla. En la unua okazo oni parolas pri “difinita nomo”, dum en la ceteraj oni parolas pri “nedifinita”, kvankam oni povus distingi inter “duondifinita aŭ unuflanke ne difinita nomo” [la okazo (b)], “duflanke nedifinita nomo” [la okazo (c)] kaj “senreferenta nomo” [la okazo (ĉ)], ekz.: la nomo *ŝtelisto* en la fra-

zo *Karlo estas ŝtelisto* kaj la nomo *libron* en la frazo *se Johano volus legi libron, li devus sin turni al la urba biblioteko*<sup>4</sup>.

Verŝajne ne ekzistas lingvoj, kiuj kapablas distingi per specialaj determinantoj la kvar gradojn de difiniteco (aŭ maldifiniteco), kiujn ni ĵus menciis. Kelkaj lingvoj, kiel ChiBemba, bantua lingvo de Zambio<sup>5</sup>, privilegias la distingon inter la referentohavaj nomoj [okazo (a) (b) (c)] kaj la senreferentaj [okazo (ĉ)]. Aliaj lingvoj, la plejmulto, distingas inter la difinitaj [okazo (a)] kaj la nedifinitaj [okazo (b) (c) (ĉ)] kaj tion faras per kompleksa sistemo de opozicioj, kie la diferencigan rolon ludas foje la vortordo, foje la intonacio, foje la diversa uzo de kazoj aŭ aliaj rilatmorfemoj. Ekzistas fine lingvoj, la malplimulto, kiuj, krom per la aluditaj rimedoj, distingas la difinitecon de la nomo disde la nedifiniteco per pli aŭ malpli disvastiĝinta uzo de speciala determinanto, la difina artikolo. Inter ĉi lastaj lingvoj, Esperanto, kun sia difina artikolo *la*, situas en la vico de la relative malmultaj, kiujn karakterizas proklitika difinartikolo.

Tiu ĉi aparta tipo de determinanto estas atestata ankaŭ ekster la mediteranea areo, sed nur en tiu areo ĝia origino kaj evoluo estas historie rekonstrueblaj.<sup>6</sup>

Ĝia elradia centro estas Egiptujo, kie proklitika difinartikolo estas plene funkcia en la lingvo de la Nova Regno ek de la 18-a dinastio (1537 a.K.). Je la fino de la 2-a miljaro ĝi aperas en la semidaj lingvoj de Kanaano, la fenica kaj la hebrea, kaj de tie ĝi etendiĝas al la nordaraba lingvo. Ĝi aperas poste en la libi-berberaj lingvoj de Nordafriko kaj en la posthomera lingvo de Greklando. De tie ĝi disvastiĝas vicvice al ĉiuj lingvoj de Eŭropo, kiuj iamaniere estis kontaĝitaj de la dialektika spirito helena: nome al la latina ĉiutaga lingvo kaj pere de ĝi, kuntrenante gravajn sintaksajn konsekvencojn, al la diversaj keltaj kaj okcidentgermanaj lingvoj. Fine la proklitika difinartikolo enradikiĝis en la hungara kaj en 1887 ĝi fariĝis unu el la trajtoj de la Internacia Lingvo.

## 2.

Estas interese rimarki, ke la distribuo de la uzo de la proklitika difinartikolo estas tre malegala de lingvo al lingvo. En kelkaj lingvoj, precipe tiuj, en kiujn ĝi enkondukiĝis en frua tempo, la difinartikolo praktike ne konas rezistojn en sia aplikiĝo kiel markanto de la difiniteco de la nomo, se escepti la vokativon kaj la proprajn nomojn kiam solaj. En aliaj lingvoj kontraŭe, en Esperanto ekzemple, la aplikado de la difinartikolo estas limigata al certaj cirkonstancoj, kiujn la gramatikistoj precize registris kaj priskribis<sup>7</sup>. Alivorte, ekzistas lingvoj, en kiuj la tradiciaj rimedoj por signali la difinitecon de la nomo, datiĝantaj al evolustadio pli antikva ol la enkonduko de la difinartikolo kaj konsistantaj plej ofte el fiksiĝintaj sintagmoj, kontraŭstaras ĝis certa grado kontraŭ la trudiĝemo de tiu ĉi novulo, limigante tiamaniere ties aplikon. En tiuj lingvoj estas tiel distingeblaj almenaŭ du sintaksaj tavoloj rilate al la nomdetermino: la postrestaĵoj de la iamaj konstruoj por la difiniteco kaj la novaj konstruoj kun la difinartikolo. Tre verŝajne tiu situacio respeguliĝas ankaŭ en Esperanto pro ties tipologia parenceco kun la lingvomodeloj, el kiuj D-ro Zamenhof ĉefe inspiriĝis: mi aludas al la jida kaj al la germana.

Estus do oportune desegni la mapon de la “rezistejoj” kontraŭ la difinartikolo kiujn Esperanto heredis, kaj esplori de kie ĝi ilin transprenis kaj kiel ĝi ilin adaptis al sia strukturo. Por tion fari estas tamen necese, unue, trovi pli taŭgan kaj unuecan difinon de la koncepto “difinita nomo” ol la kutimaj tradiciaj difinoj, kaj, due, klarigi la reton de la interrilatoj, kiuj staras inter la difinartikolo kaj la ceteraj determinantoj.

### 3. La difinita nomo

Laŭ la Plena Gramatiko de Esperanto<sup>8</sup> la nomo estas difine determinita kiam oni tre precize montras, pri kio temas, ekz.: *la viro, kiu ĵus salutis min...*; *tiu ĉi libro*. Estas male nedifine determinita la nomo, kiu esprimas, ke io estas nek konata, nek antaŭe preparolita,

ekz: *mi ricevis leteron; multaj homoj; iu poemo de Heine; ia amiko*. Laŭ I. Szerdahelyi<sup>9</sup> “difinita estas tio, kio ne estas anstataŭebla per alia individuo de la sama kategorio aŭ speco”. Ni, enkondukante la specife semantikan nocion de “antaŭsupozo”<sup>10</sup>, difinas la difinitan nomon kiel nomon implicantan en si mem asertaĵon, kiun, laŭ supozo de la parolanto, la aŭskultanto jam aŭdis aŭ eĉ eldiris kaj kiun, ĉiuokaze, li kapablas rekonstrui por identigi la referenton de la nomo mem.

Dum la nedifinita nomo postulas de la aŭskultanto nur “pasivan” partoprenon, en atendo de plua precizigo, la difinita, rilatante al supozite jam establita nocio, postulas male de la aŭskultanto “aktivan” partoprenon kaj mensan laboron por la rehavigo de la celita senco. Tial ĝi estas komparebla al la propraj nomoj kaj al la personaj pronomoj. Kaj ĝuste pro la fakto, ke la difinita nomo implicas antaŭsupozitan frazon, ĝi povas esti rigardata kiel la pli malpli eksplicita nominaligo de tiu frazo, t.e. kiel la rezulto de la transformo de tiu frazo en nominalan sintagmon.<sup>11</sup>

La plej malaltan gradon de ekspliciteco havas la difinitaj nomoj, kiujn akompanas nek semantikaj modifantoj, nek determinantoj, krom la difinartikolo se ĝi ekzistas. En tiu okazo la implicita asertaĵo estas rehavigebla nur surbaze de la kunteksto, de la parola situacio aŭ de la kulturo de ambaŭ kunparolantoj. Ekzemple, la difinita nomo *la homo* en la frazo (1) *la homo estas avida* povas esti rigardata, kondiĉe ke la prezenca tenso ricevü gnomikan<sup>12</sup> interpreton, kiel la nominaligo de ĉio, kion asertas nia kulturo pri la mamula genro homo. Se kontraŭe la frazo (1) ricevas eventecan<sup>13</sup> interpreton (parafrazeblan per *li manifestas avidon*), la implicita kaj nominaligita asertaĵo povus esti (2) *tie ĉi staras certa homo*. En tiu okazo la frazo (1) respondus al la parafrazo (3) *la homo, kiu staras tie ĉi, estas avida*.

Eventecan interpreton nepre ricevas la frazo (4) *la homo estis avida* kun la preterita tenso, kie *la homo* estas rigardebla kiel la nominaligo de la asertaĵo (5) *ni ĵus parolis pri certa homo*. La parafrazo de (4) estus en tiu okazo (6) *la homo, pri kiu ni ĵus parolis, estis avida*.



Pli eksplicitaj estas kontraŭe la nominaligoj konstituitaj de difinitaj nomoj kun unu aŭ pluraj determinantoj aŭ modifantoj. En tiu ĉi okazo, se la implicita asertaĵo havas gnomikan interpreton, t.e. entenas predikaton, kiu rilatas al kapablo aŭ potencialo, aŭ al kutima, ripetiga, karakteriza ago aŭ stato, ĝi estas rehavigebla fare de la aŭskultanto surbaze de lia kulturo kaj sperto. Ekzemple la difinitaj nominalsintagmoj (7) *lia avino [festis nobelino]*, (8) *la alveno de la hirundoj [anoncas la printempon]*, (9) *ilia alveno [anoncas la printempon]*, (10) *la kapablon skribi [oni akiras en la lernejo]*, (11) *la Ruĝa Maro [dividas Afrikon de Azio]*, (12) *la lago Bajkalo [troviĝas en Siberio]*, (13) *[donu al mi] la botelon el kristalo*, (14) *la pli forta el la manoj [estas la dekstra]*, (15) *[mi ne ŝatas] la virinon, kiu sin ŝminkas tro okulfrape* konstituas la nominaligojn respektive de la implicitaj gnomikaj asertaĵoj (7') *li havis avinon (kiel ĉiu homo)*, (8') *la hirundoj alvenas (ĉiujare de la sudaj landoj)*, (9') *ili alvenas (ĉiujare)*, (10') *skribi estas unu el al kapabloj (de la homo)*, (11') *certa maro estas rigardata kiel "ruĝa" kaj sekve estas nomata tia*, (12') *Bajkalo estas lago*, (13') *certa botelo estas el kristalo*, (14') *unu mano estas pli forta ol la alia*, (15') *certa speco de virino sin ŝminkas tro okulfrape* [la parafrazo de (15) povus esti *[mi ne ŝatas] tiuspecan virinon, kiu sin ŝminkas tro okulfrape*].

Male, se la predikato de la implicita asertaĵo havas eventecan karakteron, t.e. se ĝi rilatas al unika, lokigita evento, la implicita asertaĵo estas rehavigebla de la aŭskultanto pere de lia kunteksta memoro aŭ de la parola situacio. Ekzemple, la jenaj difinitaj nominalsintagmoj nominaligas eventecajn implicitajn asertaĵojn: (16) *lia biciklo [rustiĝas en kelo] / implicita asertaĵo [IA]* (16') *li posedas biciklon*; (17) *[mia ĉemizo estas pli blanka ol] la via / IA* (17') *vi havas ĉemizon*; (18) *la morto de Johano [afliktis ĉiujn] / IA* (18') *Johano mortis*; (19) *[mi diskutis kun] la kontoristino, kiu scias la germanan / IA* (19') *certa kontoristino scias la germanan*; (20) *tiujn librojn, kiujn li aĉetis pasintjare, [li donacis al Karlo] / IA* (20') *pasintjare li aĉetis certajn librojn*; (21) *la konsilo, ke vi prokrastu la diskuton [festis nur lerta politikaĵo] / IA* (21') *oni konsilis, ke vi prokrastu la diskuton*; (22) *la decido vendi la bienon [festis alprenita*

*la postan tagon] / IA* (22') *oni decidis vendi la bienon*; (23) *la problemo, kiamaniere loĝigi tiom da homoj [turmentis lin] / IA* (23') *kiamaniere loĝigi tiom da homoj fariĝis problemo*; (24) *la ĉeestanto, kiu — mi sincere dubas — solvus la enigmon, [festus sorĉisto] / IA* (24') *mi sincere dubas, ĉu iu ĉeestanto solvus la enigmon*; (25) *ĉiuj studentoj [sukcesis en la ekzameno] / IA* (25') *ni ĵus parolis pri certaj studentoj + (NOVA INFORMO) sen eĉ unu escepto // parafrazo de (25):(26) la studentoj, pri kiuj ni ĵus parolis, sen eĉ unu escepto, sukcesis en la ekzameno*; (27) *ĉiuj ŝipoj de la eskadrono [festis torpeditaj] / IA* (27') *la eskadrono konsistis el tiom da ŝipoj + (NOVA INFORMO) sen eĉ unu escepto // parafrazo de (27): (28) la ŝipoj aŭ tiom da ŝipoj de la eskadrono, sen eĉ unu escepto, estis torpeditaj*.

Laŭ la supre proponita tezo, ĉiu difinita nomo aŭ nominalsintagmo, sendepende de la maniero, en kiu ĝia difiniteco esta signalata (per la artikolo *la*, la posesiva adjektivo, la montra adjektivo *tiu* uzata korelativo kun la rilativo *kiu*, aŭ la kolektivo *ĉiuj* ktp) konstituas do la nominaligon pli-malpli eksplicitan de implicita asertaĵo, gnomika aŭ eventeca, kiun la parolanto antaŭsupozas kiel rehavigebla fare de la aŭskultanto dank' al ties kulturo, memoro aŭ atento.<sup>14</sup>

#### 4. La sintaksaj interrilatoj de la artikolo kun la ceteraj determinantoj de Esperanto

Ni provu nun esplori, kiamaniere laŭ pure sintaksa vidpunkto la difinartikolo en Esperanto rilatas kun la ceteraj determinantoj. La reto de la interrilatoj, kiuj staras inter la artikolo *la* [ART] unuflanke, kaj ĉiu alia subklaso de determinantoj, aliflanke, inkluzive de la tielnomata nulartikolo, nome la demonstrativoj [DEM], la indefinitoj [IND], la kolektivoj [KOL], la posesivoj [POS], la adjektivo *tuta* [TUT], la bazaj numeraloj [NUM] kaj la ordaj numeraloj [ORD], povas esti priskribita per la jena skemo:

ART				
DEM	POS	TUT	NUM	ORD
IND				
KOL				

Horizontale estas tie ĉi indikata, per la simboloj de la diversaj subklasoj, la relative konstanta ordo de sinsekvo, laŭ kiu fakultative oni povas kombini sintagme kun la difinartikolo la diversajn determinantojn por determini la saman nominalsintagmon, ekzemple;

- (29) [Karlo legis] la (tutajn) (tri) (ceterajn) ĉapitrojn;  
 (30) [li trafoliumis] (tiujn) (du) (aliajn) librojn;  
 (31) [mi renkontis] (kelkajn) malfacilaĵojn;  
 (32) [li denove sidiĝis sur] tiu (sama) seĝo;  
 (33) [li salutis per manpremoj] ĉiun unuan delegiton de la asocioj;  
 (34) [forpasis] viaj (du) (lastaj) amikoj;  
 (35) [ĉeestis] ilia (tuta) familio;  
 (36) [min vizitis] unu (mia) konato; ĉiuj miaj (multaj) amikoj.

Vertikale estas male indikataj la subklasoj de la determinantoj reciproke neakordigeblaj kaj sintagme ne kombineblaj, ekzemple:  
 (37)\* la tiu ideo; (38)\* la komercisto, la kiu bankrotis; (39)\* ĉiuj kelkaj domoj; (40)\* la ĉiuj amikoj / \* ĉiuj la amikoj; (41)\* la via ĉemizo; (42)\* la unu libro; (43)\* tiu iu suspekto; (44)\* tiu neniu ideo; (45)\* ĉiu tiu homo, kiu mensogas.

La skemo ĵus prezentita povas utili kiel bazo por esplori kiel Esperanto esprimas la difinan determinon kaj kiajn limigojn trovas en tiu sistemo la uzo de la difinartikolo *la*.

Tio, kio tuj altiras la atenton estas, ke ne ekzistas en tiu ĉi sistemo specifa determino por la nedifiniteco, krom la nulartikolo. Tiu ĉi trajto estas tre malofta en la lingvoj kun proklitika difinartikolo kaj estas atestata nur en la keltaj lingvoj, en la hungara kaj en la hebrea, fenica kaj araba.

Ke la difinartikolo ne akordigeblas kun la demonstrativoj, indefinitoj kaj kolektivoj ŝajnas tute natura fenomeno; estas rimarkinda kontraŭe la fakto, ke la artikolo *la* normale ne kombiniĝas sintagme kun la posesivoj.

## 5. La unua “rezistejo”: la posesivoj

La reciproka neakordigeblo inter la artikolo *la* kaj la posesivoj dependas de tio, ke la posesivoj, aŭ pli bone la sintagmo POS + NS, en Esperanto esprimas la difinitecon per si mem. Sendube tiu fenomeno konstituas unu el la tributoj, kiujn la Internacia Lingvo pagis al la sintaksa strukturo de la centreŭropaj lingvoj, ĉefe la jida kaj la germana, el kiuj D-ro Zamenhof inspiriĝis grandmezure en la kreo de sia lingvoprojekto. Ili estis ja la lingvoj, kiuj multdis liajn lingvokutimojn. La sama karakterizo troviĝas ankaŭ en la franca kaj en la hispana, sed en la itala kaj en la greka (kaj kun sufiksita artikolo ankaŭ en la rumana) tiu neakordigeblo ne ekzistas: la difinartikolo en sia progresiva disvastiĝo kapablis tie entrudiĝi ankaŭ ĉe nomo determinita de posesivo, ekz.: it. *il mio paese*, gr. *hē emē gē* “mia lando”, rum. *profesor-ul meu* “mia instruisto”.

Ni rimarkas, ke la persista kontraŭstaro de la sintagmo POS + NS kontraŭ la difinartikolo devigas Esperanton esprimi la nedifinitecon aŭ neŭtraligante la difindeterminan forton de la posesivo per indefinito, ekz.: *unu mia lernanto*; *kelkaj liaj amikoj*, aŭ sin turnante al partitiva konstruo, ekz.: *unu el miaj lernantoj*; *kelkaj el liaj amikoj*, t.e. uzante rimedojn similajn al tiuj de certa lingvoareo, kp. angl. *a pupil of mine*; *some of his friends*. La fakto havas siajn malavantaĝojn, ĉar ekzemple frazo kiel (46) *tiuj ĉi sinjoroj estas miaj amikoj* povas ricevi du interpretojn: unu nedifinita, *tiuj ĉi sinjoroj estas amikoj de mi*; la alian difinita, *tiuj ĉi sinjoroj estas la viroj, pri kiuj oni scias, ke ili amikiĝis kun mi*. Tamen, se en la sintagmo POS + NS la NS forestas, la distingo inter la difiniteco kaj la nedifiniteco rehaviĝas dank’ al la difinartikolo, ekz.: (47) *tiu ĉi libro estas mia* — *tiu ĉi libro apartenas al mi*; (48) *tiu ĉi libro estas la mia* — *tiu ĉi libro estas tiu, kiu apartenas al mi*.

## 6. La dua "rezistejo": la genitivaj es-formoj de la tabelvortoj

Strikte ligitaj al la posesivoj estas la genitivaj es-formoj de la tabelvortoj *kiu, tiu, iu, ĉiu, neniu*, alia "rezistejo", kie la difinartikolo en Esperanto ne estas tolerata, ekz.: (49) [*ni trairis landojn,*] *kies lingvojn [ni ne scias]*. La sintagmoj konstituataj de la es-formoj devus esti rigardataj kiel la lastaj reflektaj en la Internacia Lingvo de la tiel nomata "saksa genitivo", sintaksa fosilio, kiu ankoraŭ vivas kun diversa grado de prospero en la ĝermanaj lingvoj, konservante sian primitivan difindeterminan forton (ekz.: angl. *my father's house*, germ. *Goethes Werke*), kaj kiu kun la inversa vortordo konstituas la normalan difinitan genitivkonstruon de la keltaj lingvoj kaj de la hebrea, fenica kaj araba. La itala kaj rumana tradukoj de la frazo (49) devas necese enteni ankaŭ difinartikolon, tiom forta estas la trudiĝemo de la difinartikolo en tiuj lingvoj.

## 7. La tria "rezistejo": la plurala kaj duala kolektivoj ĈIUJ kaj AMBAŬ

La fakto, ke la artikolo *la* en Esperanto ne estas akordigebla sintagme kun la kolektivoj *ĉiu* kaj *ĉia* ne surprizas, ĉar en ĉiuj lingvoj la singularo de la kolektivo havas semantikan statuson, kiu ne povas esti rigardata kiel difinita. Male oni estus povinta antaŭvidi, ke la pluralo *ĉiuj* kaj la dualo *ambaŭ* ankaŭ en Esperanto, kiel en multaj aliaj lingvoj, enlasus la uzon de la difinartikolo, ekz. it. *tutti i paesi*, fr. *tous les pays*, hisp. *todos los países*, gr. *pâsai hai hórâi*, hung. *az összes országok*, rum. *toate țări-le* "ĉiuj landoj", hung. *mind itt van a könyv?* "ĉu estas tie ĉi ĉiuj libroj?"; it. *entrambe le mani*, rum. *amîndouă mâni-le* "ambaŭ manoj".

La fakto, ke tio tamen en Esperanto ne okazas dependas ankoraŭ de la influo de la ĝermanaj lingvomodeloj sur la Internacia Lingvo (kp. germ. *alle Länder*, angl. *all countries*; germ. *beide Hände*, angl. *both hands*: sed ankaŭ hisp. *ambas manos*) kaj de la ekskluzive difindetermina forto, kiun la sintagmo KOL (pl. aŭ dual.) + NS havis en la ĝermanaj lingvoj jam antaŭ la enkonduko de la difinartikolo.

## 8. La kvara "rezistejo": la pseŭdo-demonstrativaj uzoj de TIU kaj TIO

Ke la sintagmo DEM + NS ekskludas la uzon de la difinartikolo estas memkomprenebla fenomeno, ĉar la funkcio de la demonstrativo<sup>15</sup> estas rilatigi al la parola situacio (kies elementoj estas la parolanto, la aŭskultantoj, la tempo kaj la loko de la eldiro) nomon aŭ nominalsintagmon tute ne difinitan, kiel pruvas ekzemple la fakto, ke en la angla sintagmoj kiel *unu libro de Johano* kaj *tiu ĉi libro de Johano* kaj *tiu libro de Johano* tradukiĝas en tute alia maniero ol *la libro de Johano*:

*a book of John's*  
*this book of John's*                      kontraŭ                      *John's book.*  
*that book of John's*

La demonstrativo estas fakte la plej forta rimedo, pri kiu disponas la lingvo por aktualigi nedifinitan nomon, kaj, se en kelkaj lingvoj la demonstrativo enlasas la difinartikolon en sintagmojn kiel (a) ART + NS + DEM, (b) ART + NS + ART + DEM, (c) NS-ART + DEM kaj (ĉ) DEM + ART + NS, tio okazas ĉar la sintagmoj (a) (b) (c) estas interpreteblaj kiel *la X, kiu estas tie ĉi* (nominaligo de la implicita asertaĵo *certa X estas tie ĉi*), ekz.: egiptaraba *'il-'alam da* "tiu ĉi krajono" (a); hebrea *hâ-'iš ha-ze* "tiu ĉi viro" (b); rumana *om-ul acesta* "tiu ĉi viro" (c) paralele kun *acest om*; dum la sintagmo (ĉ) DEM + ART + NS estas interpretebla kiel *tiu ĉi, kiu estas certa X* (nominaligo de *tiu ĉi estas certa X*), ekz.: hungara *ez az ember*, klasikaraba *hâda r-raĝul* "tiu ĉi viro".

En Esperanto tamen ekzistas manieroj uzi la demonstrativon *tiu(j)*, kiuj tute ne havas demonstrativan valoron, sed male difindeterminan funkcion similan al tiu de la difinartikolo. Unu el tiuj ĉi pseŭdo-demonstrativaj sintagmoj estas (d) *tiu + NS + kiu + Verbo*, ekz.: (20) *tiuajn librojn, kiujn li aĉetis pasintjare, [li donacis al Karlo]*, restriktita relativa frazo, kiu estas en kontrasto kun la apozicia relativa frazo (50) *tiuajn ĉi librojn, kiujn li aĉetis pasintjare, [li donacis al K.]*.



En tiu ĉi tipo de sintagmo la determinanto *tiu* povas esti anstataŭata de la artikolo *la* sen grava ŝanĝo de signifo, ekz.: (51) *la librojn, kiujn li aĉetis pasintjare, [li donacis al KJ]*. Temas nur pri nuanco, malpli forta formo de anaforo.

Malgraŭ tio, ekzistas en Esperanto aliaj pseŭdo-demonstrativaj sintagmoj kun la determinanto *tiu* kaj la determina pronomo *tio*, kie la anstataŭigo per la artikolo *la* ne estas permesata:

(e) *tiu + Mallaŭda Nomo + de + Propra Nomo*, ekz.: (52) *tiu stultulo de Karlo* (nominaligo de la implicita asertaĵo *Karlo estas stultulo*), kp. hisp. *el tonto de Carlos*, kie anstataŭ la demonstrativo troviĝas la artikolo difina.

(f) *tiu + de + NS*, ekz. (53) [*la patro de Marko kaj*] *tiu de Karlo*. En Esperanto ne eblas *\*la de Karlo*, same kiel ne eblas *la + Prepozicia Sintagmo*: anstataŭ *\*la kun la blua jako* oni diras *tiu kun la blua jako*.

(g) *tiu/tio + kiu/kio + Verbo/Kopulo*, ekz.: (54) *tio, kion mi diris*, kontraste kun la hispana *lo que he dicho*; (55) *tiu, kiu transiris*, kontraste kun la hungara *a ki bejárta*; (56) *tiu, kiu estas verda*, kontraste kun la hispana *lo que es verde*.

La sintagmoj (e) (f) kaj (g) konstituas do pluan "rezistejon" en la strukturo de Esperanto kontraŭ la trudiĝemo de la difinartikolo, trudiĝemo, kiu male en kelkaj aliaj lingvoj ŝajnas ne koni limojn: en la klasikaraba kaj en la hungara ekzemple la proklitika difinartikolo servas eĉ por formi la rilativojn, ekz.: arab. *al-maktûb alladi arsaltuhû* "la letero, kiun mi sendis", hung. *a toll amit adtál* "la plumo, kiun vi donis". En la germana la difinartikoloj kaj la rilativoj eĉ koincidas.

## 9. La kvina kaj lasta "rezistejo": la fakultativa uzo de la artikolo LA antaŭ la nomoj de abstraktaĵoj kaj de materialoj

La difinartikolo en la sistemo de Esperanto renkontas ankoraŭ unu kontraŭstaron, kiu estas tamen malpli forta ol la supre menciitaj. Temas pri la prefero, kiun la Internacia Lingvo heredis de la

centreŭropaj lingvoj, ne uzi la artikolon *la* antaŭ la nomoj de abstraktaĵoj kaj de materialoj<sup>16</sup> en gnomikaj propozicioj, ekz.:

(57) *amo estas donaco de Dio*, (58) *fero estas metalo*, (59) *drinko estas danĝera pasio*.

En tiu ĉi okazo, kiel oni vidas, la nomo estas nenombrebla kaj la predikato ne rilatas al individua evento tempospace limigita. Eblas tial du elektoj: aŭ rigardi la nomon kiel la nominaligon de tio, kion nia kulturo asertas pri ties referento (difinita interpreto: *la amo de la homoj*; *tio, kion ni nomas fero*; *la plezuriĝo en la trinkado de alkoholaĵoj*), aŭ rigardi ĝin kiel senreferentan nomon, iamaniere derivitan de la asertaĵoj (57') *se X estas amo*, *ĝi estas donaco de Dio*; (58') *se X estas fero*, *ĝi estas metalo*; (59') *se iu drinkas*, *li havas danĝeran pasion* (nedifinita interpreto).

Ĉe kelkaj aŭtoroj estas ankaŭ atestata la tendenco ne uzi la artikolon en gnomikaj frazoj, kies subjekto estas nombrebla kaj plurala, ekz. (60) *cikonioj manĝas ranojn* anstataŭ *la cikonioj manĝas la ranojn*. Temas ankoraŭ pri centreŭropa lingvokutimo, kiu influis la Internacian Lingvon, ekz.: germ. *Störche fressen Frösche*, nederlanda *oojveaars eten kikvorsen*<sup>18</sup>. Sed estas interese rimarki, ke kiam la nomo estas modifata de epiteto, tuj ŝaltiĝas la mekanismo de la difindetermino kaj reaperas la difinartikolo, ekz.: (61) *la cikonioj de Turkujo manĝas ranojn*, (62) *la sincera amo estas granda trezoro*, (63) *la sveda fero estas alte taksata*, (64) *la ofta drinko ruinigas*<sup>19</sup>.

## 10. Konkludo

Nia esploro pri la diversaj manieroj, en kiuj Esperanto esprimas la difinan determinon de la nomo per kaj sen artikolo, ne estas ĝisfunda nek pretendas esti tia. Ni ne kuraĝis ĝin antaŭenigi en la malolidan kaj insidan terenon de la frazeologio, kiu tamen meritis studon. Tial ni limiĝis al la izolo de la ĉefaj sintakasaj konstruoj, kiuj difine determinas la nomon sen la helpo de la artikolo *la*. Tiujn "rezistejojn", kiuj limigas la aplikadon de la difinartikolo en Esperanto, ni eksplikis kiel la reflektojn de la denaskaj lingvokutimoj de

la kreinto de la Internacia Lingvo. Ili fakte respegulas kaj kvazaŭ fotografas la situacion, kiun atingis en la centreŭropaj lingvoj, precipe en la germana, la disvastiĝo de la uzo de la proklitika difinartikolo, tipo de determinanto relative nova en la lingvoj de Eŭropo. Tiu fakto konfirmas ankaŭ en la kampo de la nomdetermino la tezon de la tipologia simileco de Esperanto kun la lingvoj de centra Eŭropo, kiun aliaj esploroj evidentigis en aliaj kampoj.<sup>20</sup>

1. Pri la nocioj "aktualigo de la nomo" (fr. *actualisation*) kaj "determinantoj" (fr. *déterminants*) de la strukturismaj kaj gener-transformaciaj gramatikoj mi referencas al: E. ARCAINI, *Principi di linguistica applicata*, Bologna 1967, p. 49; A. COLOMBO, *I determinanti in italiano: un esperimento di grammatica generativa*, en *Lingua e Stile*, IV, 2 (1969), pp. 183-203; A. NICULESCU, *La determinazione in rumeno e in italiano*, en *S.L.J., L'insegnamento dell'italiano in Italia e all'Estero*, Roma (Bulzoni ed.) 1971, vol. II, pp. 579-601. Aliaj aŭtoroj, ekzemple R.J. HAYWARD, *The Stative Conjugation in 'Afar*, en *Annali dell'Istituto Orientale di Napoli*, XXXVIII [N.S. XXVIII], 1 (1978), pp. 1-39, preferas nomi la determinantojn "difinitivoj" (angle *definitives*) kaj inkludigas inter ili ankaŭ la posesivojn, kiel ni faras. La posesivoj estas konsiderataj kiel determinantoj ankaŭ de K. KALOCSAY — G. WARINGHIEN, *Plena Gramatiko de Esperanto*, 3-a eld., Milano 1958, p. 100.
2. Kp. A. COLOMBO, *verko citita*, p. 183; M.G. DE BOER, *Il concetto di articolo con speciale riguardo all'italiano*, en *Studi italiani di linguistica teorica ed applicata*, I, 3 (1972), pp. 511-536.
3. Angle *modifiers*, kp. D. PARISI — F. ANTINUCCI, *Elementi di grammatica*, Torino (Boringhieri ed.) 1973, pp. 140-141.
4. Pri la terminoj "duondifino"/"unuflanka nedifin(it)eco" kaj "duflanka nedifin(it)eco" mi referencas al K. KALOCSAY — G. WARINGHIEN, *verko citita*, p. 104, kaj al I. SZERDAHELYI, *La artikolo*, en *Esperantologiaj Kajeroj 1.*, Budapeŝto

- 1976, pp. 124-125. Pri la termino "senreferenta nomo", kp. T. GIVÓN, *Opacity and reference: an inquiry into the role of modalities*, en J.P. KIMBALL (ed.), *Syntax and Semantics*, vol. 2, New York and London (Seminar Press) 1973, pp. 95-122, speciale pp. 111-119.
5. Kp. T. GIVÓN, *verko citita*, pp. 95-122.
6. Kp. F.A. PENNACCHIETTI, *Studi sui pronomi determinativi semitici*, Napoli 1968, p. 73; B. KROEBER, *Die Neuägyptizismen vor der Amarnazeit*, Tübingen 1970, pp. 1-30; A. LOPRIENO, *Osservazioni sullo sviluppo dell'articolo prepositivo in egiziano e nelle lingue semitiche*, in *Oriens Antiquus* (Roma), XIX, 1 (1980), pp. 1-27.
7. Kp. K. KALOCSAY — G. WARINGHIEN, *Plena Gramatiko de Esperanto*, pp. 94-99; K. KALOCSAY, *Lingvo Stilo Formo*, 3-a eld., Oosaka 1970, pp. 77-81; I. SZERDAHELYI, *verko citita*, pp. 121-131.
8. K. KALOCSAY — G. WARINGHIEN, *verko citita*, pp. 94-95.
9. I. SZERDAHELYI, *verko citita*, pp. 123-124.
10. Kp. D. PARISI — F. ANTINUCCI, *verko citita*, pp. 170-184; G. CINQUE, "Presupposizioni" di voci lessicali e di costrutti e loro rilevanza sintattica, en *Fenomeni morfologici e sintattici nell'italiano contemporaneo*, (Atti del Sesto Congresso Internazionale di Studi della Società di Linguistica Italiana, Roma 4-6 settembre 1972), Roma (Bulzoni ed.) 1974, pp. 47-69.
11. Kp. C. CASTELFRANCHI, *Idee per una teoria delle nominalizzazioni, Parte prima*, (Istituto di Psicologia, C.N.R., Rapporto tecnico n. 187), Roma 1977; F.A. PENNACCHIETTI, *Enkondukaj teoriaj konsideroj ĉirkaŭ la temo: la nomigo en Esperanto kaj provo ĝin formalizi*, en *Paderborner Arbeitspapiere*, 38 (1978), pp. 15-50 (2. Werkstattgespräch "Interlinguistik in Wissenschaft und Bildung", Institut für Kybernetische Pädagogik, FEoLL, Paderborn 24-26.11.1977).
12. Kp. A. PUGLIELLI — C. CASTELFRANCHI, *Sul congiuntivo nelle frasi relative e il modo ipotetico*, en *Rivista di Grammatica Generativa*, I, 2 (1976), pp. 79-100.
13. Idem, *ibidem*.
14. Kp. E. RIGOTTI, *Il significato dell'articolo in italiano*, en *Studi italiani di linguistica teorica ed applicata*, I, 1 (1972), pp. 85-132.
15. Kp. G. CINQUE, *Analisi semantica della deissi in italiano* (Doktora disertacio. Istituto di Filologia Neolatina. Università di Padova), Padova 1971; Idem, *Sulla deissi "linguistica"*, en *Lingua e Stile*, XI, 1 (1976), pp. 101-126.
16. Kp. K. KALOCSAY — G. WARINGHIEN, *verko citita*, p. 96; K. KALOCSAY, *Lingvo Stilo Formo*, p. 80.
17. B. RUSSEL, *Logic and knowledge*, London 1956, pp. 41-56.
18. K. KALOCSAY, *Lingvo Stilo Formo*, p. 80: "Hirundoj anoncas la alvenon de la printempo"; M.G. DE BOER, *verko citita*, p. 532.
19. K. KALOCSAY, *Lingvo Stilo Formo*, p. 80.
20. Kp. F.A. PENNACCHIETTI, *La internacieco de Esperanto kaj la karaktero de la hindeŭropaj elementoj en ĝi*, en *Horizonto*, III, 13 (1978), pp. 5-9.